

& Mia penso:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (antaŭ 1887). Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por "Konfeso" kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodioj:

<1,5:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a;))×8)+

(&Strofoj:

'1 Sur la kampo for de l' mondo, ; antaŭ nokto de somero, ; amikino en la rondo ; kantas kanton pri l' espero.

(×: **Zorgojn li havis pri lingvo, ; Ĉu sukceson li atingos, ; Klara estis lia cel', ; Zorgojn li havis pri lingvo.**)

'2 Kaj pri vivo detruita ; ŝi rakontas kompatante, – ; mia vundo refrapita ; min doloras resangante.

'3 "Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro, ; kial tia senmoveco? ; Ha, kredeble rememoro ; el la kara infaneco?"

'4 Kion diri? Ne ploranta ; povis esti parolado ; kun fraŭlino ripozanta ; post somera promenado!

'5 Mia penso kaj turmento, ; kaj doloroj kaj esperoj! ; Kiom de mi en silento ; al vi iris jam oferoj!

'6 Kion havis mi plej karan – ; la junecon – mi ploranta ; metis mem sur la altaron ; de la devo ordonanta!

'7 Fajron sentas mi interne, ; vivi ankaŭ mi deziras, – ; io pelas min eterne, ; se mi al gajuloj iras.

'8 Se ne plaĉas al la sorto ; mia peno kaj laboro – ; venu tuj al mi la morto, ; en espero – sen doloro!